Fervoja Esperantisto

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio
Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

STIFTUNG BSW

Numero 2 Aprilo - Junio 2018

Adiaŭo

Ein Abschied



Malklara ĉielo super la kolonio Waidesgrund
(vd. paĝo 3, foto: Bodo Ehrlich)

Trüber Himmel über der Kolonie Waidesgrund
(s. Seite 3, Foto: Bodo Ehrlich)

Karaj gelegantoj	2	Liebe Leserinnen und Leser	2
La lasta kunveno ĉe Karin	3	Das letzte Treffen bei Karin	3
Novaj medioj ĉe BSW	4	Neue Medien beim BSW	4
Senspira en Vroclavo	6	Atemlos in Wrocław	6
Wrocław – opinio de redaktoro	8	Wrocław – Meinung eines Redakteurs	8
Ne pripensu to longe!	9	Denkt nicht zu lange nach!	9
Manfred Retzlaff	10	Manfred Retzlaff	10
Horst Jasmann	11	Horst Jasmann	11
GEFA-anoncoj, redakcio	12	GEFA-Mitteilungen, Redaktion	12



Karaj gelegantoj,

impresis jam la nura kvanto. Kvindek mil tutdaŭraj partoprenantoj, dudek kvin mil unutagaj gastoj. Ne nur en tiu rilato la Katolikaj Tagoj en Münster memorigis pri la konferenco 370 jarojn pli frue kondukinta al la Vestfalia paco. Siatempe en la urbo estis same multaj delegacianoj kiel enloĝantoj.

La devizo de la aranĝo estis „Serĉu Pacon!“ (aŭ „mi serĉas pacon“ laŭ persona interpreto).

Ĉar ĝuste tio estas la esenca mesaĝo de la Esperanto-parolantoj, IKUE, la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, en kunlaboro kun la Esperanto-grupo Münster instalis kaj okupis standon en la „Eklezia Kvartalo“.

Absolute plenumiĝis la espero tie renkonti homojn malfermajn kaj interesitajn. Dum tri tagoj evoluis sennombraj mallongaj kaj detalaj konversacioj pri la historio, pri la praktiko kaj pri la koncepto de nia lingvo. Vastan superrigardon pri la avantaĝoj kaj specialaĵoj Hedwig kaj D-ro Rudolf Fischer sukcesis peri al vigla publiko per seminaria prelego spicita per lingvaj anekdotoj en la kadra programo.

Estis streĉaj sed kontentigaj tagoj. Kunfaldante meblojn kaj afiŝojn estis nia komuna resumo, ke ni sukcesis kompletigi la devizon pri pacoserĉado: „… kaj paco bezonas interkompreniĝon.“

Guido Brandenburg

Liebe Leserinnen und Leser,

es beeindruckte schon die schiere Menge. Fünfzigtausend Dauerteilnehmer, fünfundzwanzigtausend Tagesgäste. Nicht nur in dieser Hinsicht erinnerte der Katholikentag in Münster an die Konferenz, die 370 Jahre zuvor zum Westfälischen Frieden geführt hatte. Seinerzeit waren ebenso viele Delegationsmitglieder wie Einwohner in der Stadt.

Das Motto der Veranstaltung war „Suche Frieden!“ (oder „ich suche Frieden“ nach persönlicher Interpretation).

Da gerade das die Kernbotschaft der Esperanto-Sprecher ist, hat IKUE, die Internationale Katholische Esperanto Vereinigung in Zusammenarbeit mit der Esperanto-Gruppe Münster einen Stand auf der „Kirchenmeile“ eingerichtet und besetzt.

Die Hoffnung dort offenen und interessierten Menschen zu begegnen hat sich absolut erfüllt. Während drei Tagen entwickelten sich zahllose kurze und ausführliche Gespräche über die Geschichte, die Praxis und das Konzept unserer Sprache. Einen breiten Überblick über die Vorteile und Eigenheiten konnten Hedwig und Dr. Rudolf Fischer einem lebhaften Publikum durch einen mit sprachlichen Anekdoden gewürzten Seminarvortrag im Rahmenprogramm vermitteln.

Es waren anstrengende aber befriedigende Tage. Beim Zusammenfalten der Möbel und Plakate war unser gemeinsames Resumee, dass es uns gelungen war, das Motto von der Friedenssuche zu erweitern: „… und Frieden braucht Verständigung.“



21.07.2018
Aliĝofino Prerow

Guido Brandenburg



Post sukcesa kunsido en la jaro 2008 la GEFA-estraro pozas por grupfoto antaŭ la trinkejo de Karin.
Nach erfolgreicher Sitzung im Jahr 2008 posiert der GEFA-Vorstand vor Karins Kneipe.
(antaŭe/vorn: Horst Jasmann, Karl Bernhard, Siegfried Krüger, Fritz Lautenbach, Helga Vogelsang, Rolf Terjung, Manfred Retzlaff,
malantaŭe/hinten: Claudia Würker, Karl-Heinz Marzahn, Walter Ullmann, Bodo Ehrlich, Achim Meinel)

La lasta kunveno ĉe Karin - melankolia rerigardo al GEFA-tradicio

Ni kunsidas en Fulda, ĉe Karin, en eta trinkejo en laŭbo meze en Fulda, la socia centro de la ĝardenkolonio „Waideslust“, ne malproksime de la Esperanto-hotelo. Estas tre gemute tie: La hundo salutas ĉiun novalvenanton en la gastĉambro kaj ĉe la murbretoj pendas ŝildetoj kun humuraj proverboj pri libera biero kaj tradicioj.
Ni bone laboras sed ankaŭ multe ridas. En ies lacaj okuloj estas videbla la frua ellitiĝo kaj foje la longa alvojaĝo. Bodo raportas el la BSW-centralo. Ni parolas pri la membroevoluo kaj novaj medioj kaj planas por la jarkunveno en Prerow.

Das letzte Treffen bei Karin - ein wehmütiger Rückblick auf eine GEFA-Tradition

Wir sitzen in Fulda zusammen, bei Karin, in der kleinen Kneipe in einer Laube mitten in Fulda, dem sozialen Zentrum der Gartenkolonie „Waideslust“, nicht weit vom Hotel Esperanto. Es ist urgemütlich dort. Der Hund begrüßt jeden Neuankömmling im Gastzimmer, und an den Wandbrettern hängen Schilder mit humorigen Spüchen über Freibier und Traditionen.
Wir arbeiten gut aber lachen auch viel. Dem einen oder anderen ist das frühe Aufstehen und die teils lange Anreise an den müden Augen anzusehen. Bodo berichtet aus der BSW-Zentrale. Wir sprechen über die Mitglie-

Karin bone nutras nin. Ŝi estas kuirinta bongustajn bovo-viandajn rulaĵojn por la tagmanĝo. Sed la enkondukaj vortoj antaŭ la manĝoj tristigas nin: Fine de Novembro la lukontrakto por la trinkejo de Karin finiĝos, kaj la tuta ĝardenkolonio cedos al domoj inter alie kun apartamentojn por studentoj.
Do vivu bone, Karin, vivu bone, multjara kara tradicio!

Andreas Diemel

derentwicklung und neue Medien und planen für das Jahrestreffen in Prerow.
Karin verpflegt uns gut. Sie hat zum Mittagessen leckere Rinderrouladen gekocht. Aber die einleitenden Worte vor dem Essen machen uns traurig: Ende November läuft der Pachtvertrag für Karins gemütliche Kneipe aus, und die ganze Gartenkolonie wird Häusern weichen, unter anderem mit Wohnungen für Studenten.
Also lebe wohl, Karin, lebe wohl, langjährige liebgewonnene Tradition!

(trad. Diemel)



Novaj medioj ĉe BSW

La fondaĵo BSW novinstalis sian koncepton por la novaj sociaj medioj.
Tiel temas pri interkonekti la membrojn de la BSW-mondo per la interreto, informi ili kaj envolvi ilin en la aktivaĵojn. Tiucele la fondaĵo kreis la sekvajn kvar kanalojn.
www.bsw-talk.de: En sep diversaj rubrikoj membroj povas raporti pri siaj aktivaĵoj ene de BSW.
En la rubriko „Aus der Ferienwelt“ (el feria mondo) ekzemple Susanne kaj Ulrich raportas

Neue Medien beim BSW

Die BSW-Stiftung hat ihr Konzept für die neuen Sozialen Medien neu aufgestellt.
Dabei geht es darum, die Mitglieder der BSW-Welt über das Internet zu vernetzen, zu informieren und in die Aktivitäten einzubeziehen. Dazu hat die Stiftung die folgenden vier Kanäle ins Leben gerufen.
www.bsw-talk.de: In sieben verschiedenen Rubriken können Mitglieder von ihren Aktivitäten innerhalb der BSW berichten.

pri sia BSW-ekskluziva vojaĝo al Hindujo. La mallonga artikolo pri la aventuro estas ilustrita per bildoj kaj krome estas aldonita ligilo por la kazo, ke la legantoj same volas mendi la vojaĝon

En la rubriko „Bahnblick“ (rigardo al fervojo) la fondaĵo BSW kiel la plej granda sociala partnero de DBAG prilumas aktivecojn de la fervojo, kiuj ne estas en la ĉiutaga fokuso. Unu artikolo en „Bahnblick“-artikolo ekz. informas pri la evakua ekzerco el la nova ICE 4, alia pri la vizito de la estro de Germana Fervojo al la DB-tago de la regionoj.

La paĝo vivas de tio, ke aktivuloj aliĝas al la retejo kaj aldonas siajn travivaĵojn kiel malgrandajn brikojn. Kromaj rubrikoj en www.bsw-talk.de estas „el la regionoj“, „historio“, „hobio kaj libertempo“, „konsiloj kaj sociaj aferoj“.

Ĉe la adreso **www.bsw-veranstaltungen.de** troveblas aranĝoj ene de la BSW-fondaĵo. Per filtromasko oni povas limigi la aranĝojn laŭ tempo, loko aŭ temo. La trovitaj datojn oni vidas en bonorda listo. Alklako de detaloj kondukas al pliaj informoj.

La paĝo **www.bsw-treffpunkt.de** celas interligi homojn por aktivecoj. Unu artikolvorto en la ĉefpaĝo estas „realigi projektojn“. Jen ekz. serĉas grupo de homoj el la sekcio „fervoja heredaĵo“ helpon por la renovigo de malnova trajnkonduka simulilo de la berlina urbfervojo el la jaro 1969.

Tie oni ankaŭ klopodas altiri pliajn BSW-ambasadorojn, kiuj reprezentu la celojn de la BSW-fondaĵo en la entreprenoj.

Pliaj menupunktoj en la retejo estas subtenopetoj kaj ofertoj, en kiuj temas ekz. pri helpantoj por facilaj helplaboroj dum aranĝoj (porti kestojn). Sur la „foira placo“ ĉasantoj kaj kolektantoj estas en la ĝusta loko.



Por la uzado en poŝtelefono BSW kreis la aplikaĵon **BSW-App**. Ĝi ebligas survoje profiti de ĉiuj avantaĝoj el la BSW-mondo.

Unter der Rubrik „Aus der Ferienwelt“ z.B. berichten Susanne und Ulrich von einer BSW-Exklusiv-Reise nach Indien. Der kurze Artikel über das Erlebnis ist bebildert und mit einem Link versehen für den Fall, dass die Leser diese Reise ebenfalls buchen wollen.

Unter der Rubrik „Bahnblick“ beleuchtet die BSW-Stiftung als größter Sozialpartner der DB AG Tätigkeitsbereiche der Bahn, die nicht unbedingt im täglichen Fokus stehen. Ein „Bahnblick“-Artikel informiert z.B. über eine Evakuierungsübung aus dem neuen ICE 4, ein anderer über den Besuch des Bahnchefs beim DB-Regionentag.

Die Seite lebt davon, dass Aktive sich dort anmelden und ihre Erlebnisse als kleine Bausteine eintragen. Weitere Rubriken auf www.bsw-talk.de sind „aus den Regionen“, „Historie“, „Hobby und Freizeit“, „Ratgeber sowie Soziales“.

Unter **www.bsw-veranstaltungen.de** finden sich Veranstaltungstermine innerhalb der BSW-Stiftung. Mit einer Filtermaske kann man die Veranstaltungen zeitlich, örtlich und thematisch eingrenzen. Die gefundenen Termine sieht man in einer übersichtlichen Liste. Ein Klick auf Details führt zu weiteren Informationen.

Die Seite **www.bsw-treffpunkt.de** ist dazu gedacht, Menschen für Aktionen zusammenzubringen. Ein Schlagwort auf der Seite ist „Projekte verwirklichen“. Hier sucht z.B. eine BSW-Gruppe aus dem Bereich „Eisenbahnerbe“ Hilfe zur Renovierung eines Fahrsimulators der Berliner S-Bahn aus dem Jahr 1969.

Dort wirbt man auch um weitere BSW-Botschafter, die in den Betrieben die Ziele der BSW-Stiftung vertreten sollen. Weitere Menüpunkte sind Unterstützungs-Gesuche und -Angebote, bei denen es z.B. um Helfer für leichte Hilfstätigkeiten bei Veranstaltungen (Kisten tragen) geht. Auf dem „Marktplatz“ sind Jäger und Sammler am richtigen Ort.

Für die Nutzung auf dem Smartphone ist die **BSW-App** gedacht.

Diese macht alle Vorteile aus der BSW-Welt unterwegs zugänglich.

En la rubriko „novaĵoj“ oni povas sendigi aktualaĵojn regule al sia poŝtelefono. Per la funkcio „en la proksimo“ oni povas trovi samideanojn apudajn. Ankaŭ la donacado de mono estas sendrate aranĝebla, same kiel la aĉetumado en la reta butiko de BSW.

In der Rubrik „News“ kann man sich regelmäßig Neuigkeiten auf das Mobiltelefon schicken lassen. Mit der Funktion „In meiner Nähe“ kann man Gleichgesinnte in der Umgebung finden. Auch das Spenden kann mit der App drahtlos geregelt werden, ebenso wie der Einkauf im Fanshop des BSW

Andreas Diemel

(trad. Diemel)

Senspira en Vroclavo

Kvankam najbaroj la germanoj nur venis kun modesta delegacio. La paralele okazanta german-franc-luksemburga kongreso en Zweibrücken evidente detenis multajn kandidatojn de la vojaĝo trans la limon al Pollando. Nur unu estis moviĝema sufiĉe por kunpreni ambaŭ aranĝojn.

En sobraj ciferoj: Aliĝis 123 esperantistoj el 19 landoj. La plej longan vojon havis Tianyi WANG (batalnomo „Ĉielismo“), kiu kaptis la okazon reklami por fervojspecifaj produktaĵoj el Ĉinio.

Vroclavo estas urbo kun impona riĉeco je arkitekturaj belaĵoj kaj kulturaj ofertoj. Bonintence la organizantaro klopodis elmontri tion apud kvanto de laŭstatutaj IFEF-kunvenoj kaj fakaj aranĝoj en programo densigita al kvin tagoj. La sufiĉe energiaj ĉeestis ĉion. La resto rezignis kaj jen tie jen tie enŝovis kelkajn horojn da ripozo aŭ memstarajn promenojn.



La preĝejo de la paco en Świdnica
die Friedenskirche in Świdnica

Atemlos in Wrocław



Eksponaĵo en *Jaworzyna Śląska*
Ausstellungsstück in Jaworzyna Śląska

Obwohl Nachbarn kamen die Deutschen mit relativ bescheidener Delegation. Der parallel verlaufende deutsch-französisch-luxemburgische Kongress in Zweibrücken hat offenbar viele davon abgehalten, über die Grenze nach Polen zu reisen. Nur einer war mobil genug beide Veranstaltungen mitzunehmen.

In nüchternen Zahlen: Angemeldet waren 123 Esperanto-Sprecher aus 19 Ländern. Den längsten Weg hatte Tianyi WANG (Kampfname „Ĉielismo“), der die Gelegenheit ergriff, für Eisenbahnprodukte aus China zu werben.

Wrocław ist eine Stadt mit imponierendem Reichtum an architektonischen Schönheiten und kulturellen Angeboten. Das Vorbereitungsteam hat sich in guter Absicht bemüht, das neben einer Menge satzungsgemäßer IFEF-Versammlungen und Fachveranstaltungen in einem auf fünf Tage verdichteten Programm zu zeigen. Die Fitten waren bei allem dabei. Der Rest verzichtete und schob da

La apetiton je fervojfakaj informoj trankviligis manpleno da historiaj, aktualaj kaj futurismaj prelegoj

Priservi la intereson pri fervojfaka praktiko sukcesis ekskurso per regiona trajno al la fervoja muzeo de *Jaworzyna Śląska* en iama lokomotivdeponejo: multaj bele restaŭritaj veturiloj kaj multaj dormantaj trezoroj postulantaj ankoraŭ enorman kvanton de mono kaj laboro.

La muzeo ne sole celas al fervoja romantiko. Kelkaj de la eksponataj vagonoj dokumentis la rolon de la fervojo kiel armilo en la milito kaj en la loĝistiko de transloĝigo kaj forpelo.

Pliaj ekskursoj kondukis al lokoj memorigantaj, ke Silezio estis loĝata ankaŭ de germanoj, prusoj, aŭstroj. Min persone malpli impresis la multaj kasteloj kaj palacoj sed pli la intertempe pli ol 360 jarojn aĝa preĝejo de la paco en Świdnica, konstruita post la 30-jara milito el lignotraboj, donanta spacon por 7.500 preĝantoj.



Carsten „Kaši“ Schnathorst Kaši dum sia koncerto en la stacidoma halo
Carsten „Kaši“ Schnathorst bei seinem Konzert in der Bahnhofshalle

La multa muziko prezentita de ĥoroj, orkestretoj kun kostumitaj dancantoj, solkantistoj, kantgrupoj ornamis la kongreson kaj peris perfekte la atmosferon de la vigla kaj juna urbo Vroclavo.

und dort einige Stunden Ausruhen oder selbständige Spaziergänge ein.

Den Hunger auf eisenbahnfachliche Informationen beruhigte eine Handvoll historischer, aktueller und futuristischer Vorträge.

Das Interesse für eisenbahnfachliche Praxis bediente ein Ausflug mit dem Regionalzug zum Eisenbahnmuseum von Jaworzyna Śląska in einem ehemaligen Lokomotivdepot: Viele schön restaurierte Fahrzeuge und viele schlafende Schätze, die noch eine erhebliche Menge Geld und Arbeit verlangen.

Es geht dem Museum nicht allein um Eisenbahnromantik.



Vojoj de transloĝigo kaj forpelo
Wege von Umsiedlung und Vertreibung

Einige ausgestellte Waggons belegen die Rolle der Eisenbahn als Waffe im Krieg und in der Logistik von Umsiedlung und Vertreibung.

Weitere Ausflüge führten zu Orten, die daran erinnerten, dass Schlesien auch von Deutschen, Preußen, Österreichern bewohnt war. Mich selbst haben weniger die vielen Schlösser und Paläste beeindruckt als die inzwischen mehr als 360 Jahre alte Friedenskirche in Świdnica, nach dem 30-jährigen Krieg aus Holzbalken gebaut, die Raum für 7.500 Gläubige bietet.

Die viele Musik, die Chöre, die kleinen Orchester mit Tänzern in Tracht, Solisten und Gesangsgruppen schmückte den Kongress aus und vermittelte perfekt die Atmosphäre der lebhaften und jungen Stadt Wrocław.

Guido Brandenburg

(trad. Brandenburg)

Wrocław –opinio de redaktoro



Ni estis kore bonvenigataj de niaj polaj gastigantoj en *Wrocław*...
Mi ĉiam estis klopodanta pri la ĝusta prononcmaniero rakontante kien mi volis veturi dum pentekosto. „Kial vi ne diras ‚Breslau'?" sekvis la demando post la necesa klarigo. „Ĉar ĝi hodiaŭ estas pola urbo kaj tial nomiĝas tiel."
„Pola urbo?"
Tiam ni estis do enmeze de la disputo pri la germana historio, pri la milito kiel sekvo de rasisma aroganteco, pri la suferoj de la civila loĝantaro, pri la translokigo de tuta ŝtato, pri fuĝo kaj forpelo.
Kaj pri la klopodo repaciĝi per agnosko de la pola okcidenta limo kaj signo de humileco kontraŭ la viktimoj.
Wrocław estis bohemia, hungara, aŭstra, prusa, germana kaj pola – kelkfoje interŝanĝe. Ĉiu el la epokoj postlasis ŝpurojn, kiuj riĉigas la urbon. Kiu volas vidi ilin ne havas malfacilaĵojn ilin trovi. Ĉiu havas la rajton senti sin hejma tie, sed neniu dedukti el tio iujn ajn pretendojn.
Povas esti, ke multaj ankoraŭ rigardas al Silezio kun amara sento. Ili tamen ne rajtas forgesi, ke milito neniam kreas justecon kaj ke la naziismo ĝuste ne estis nur makulo postlasita de preterfluganta birdo sur la germana historio.

21.07.2018
Aliĝofino Prerow

Guido Brandenburg

Wrocław –Meinung eines Redakteurs

Wir wurden herzlich willkommen geheißen von unseren polnischen Gastgebern in Wrocław…
Ich hatte mir mit der richtigen Aussprache immer Mühe gegeben, wenn ich erzählte wohin ich über Pfingsten fahren wollte. „Warum sagst du nicht ‚Breslau'?" hieß es dann nach der fälligen Erklärung. „Weil es heute eine polnische Stadt ist und sie deswegen so heißt. „Eine polnische Stadt?"
Da waren wir dann mitten drin, im Streit über die deutsche Geschichte, vom Krieg als Folge rassistischer Überheblichkeit, von den Leiden der Zivilbevölkerung, von der Verlagerung eines ganzen Staates, von Flucht und Vertreibung.
Und vom Versuch der Versöhnung durch Anerkennung der polnischen Westgrenze und einem Zeichen der Demut vor den Opfern.
Wrocław war böhmisch, ungarisch, österreichisch, preußisch, deutsch und polnisch – manchmal wechselweise. Jede der Epochen hat ihre Spuren hinterlassen, die die Stadt bereichern. Wer sie sehen will, hat keine Schwierigkeiten sie zu finden. Jeder hat das Recht sich dort zu Hause zu fühlen, aber keiner, daraus irgendwelche Ansprüche abzuleiten.



Silezio en la 10-a jarcento
Schlesien im 10. Jahrhundert
(Mapo/Karte: Poznaniak, WikiMedia)

Mag sein, dass viele noch mit einem bitteren Gefühl auf Schlesien blicken. Sie dürfen jedoch nicht vergessen, dass ein Krieg niemals Gerechtigkeit schafft und dass der Nationalsozialismus eben nicht nur ein Fleck war, den ein vorbeifliegender Vogel auf der deutschen Geschichte hinterlassen hat.

(trad. Brandenburg)

Ne pripensu tro longe!



La hotelo, la „Malnova Stacidomo Prerow“
Das Hotel, der „Alte Bahnhof Prerow“
(Foto: Stiftung BSW)

La BSW-hotelo “Malnova Stacidomo Prerow” estas malgranda. Kiel ni raportis, ĝi estas konstruaĵo kun origine alia tasko, kiun la fondaĵo BSW aĉetis kaj adaptis al la bezonoj de hotelo. Ĝi havas pro tio apartan ĉarmon kaj multaj objektoj memorigas pri la rolo, kiun ĝi havis. Sed pro tio ĝi kompare al aliaj BSW-hoteloj ofertas nur malmultajn litojn. Ni klopodas plenigi la domon kaj celante internaciigi la aranĝon ankaŭ propagandis ĝin eksterlande.

Ni procedos kiel en pasintaj jaroj kaj post aliĝofino la **21-a de Julio 2018** redonos la neokupitajn ĉambrojn. Aliĝojn pli malfruajn ni memkompreneble klopodos konsideri. Sed devos ilin rifuzi, se ne estos plu disponeblaj ĉambroj.

Do ne pripensu tro longe! Rigardu en la laste aperintan eldonon 01/2018 de la Fervoja Esperantisto, plenigu la tie presitan aliĝformularon, sendu ĝin paperpoŝte al la adreso:

BSW-Ortsstelle Werk Kassel
Freizeitgruppe Esperanto
Frasenweg 20-36
3428 Kassel
aŭ retpoŝte al esperanto@bsw.24.de

Kaj ne forgesu ĝiri la partoprenkotizon kaj la hotelkostojn kun indiko
“Esperanto – Prerow” al:

Stiftung Bahn-Sozialwerk (BSW)
Sparda-Bank West
IBAN: DE96 3606 0591 0002 4024 02
BIC: GENODED1SPE

Guido Brandenburg

Denkt nicht zu lang nach!

Das BSW-Hotel „Alter Bahnhof Prerow“ ist klein. Wie wir berichteten, ist es ein Gebäude mit einer ursprünglich anderen Aufgabe, das die Stiftung BSW gekauft und an die Bedürfnisse eines Hotels angepasst hat. Es hat deshalb seinen eigenen Charme und viele Gegenstände erinnern an die Rolle, die es hatte. Aber deshalb bietet es im Vergleich zu anderen BSW-Hotels nur wenige Betten an. Wir bemühen uns, das Haus zu füllen und haben mit dem Ziel, die Veranstaltung international zu machen, auch im Ausland dafür geworben.

Wir werden wie in den vorherigen Jahren vorgehen und nach dem Anmeldeschluss am **21.07.2018** die nicht besetzten Zimmer zurückgeben.

Spätere Anmeldungen versuchen wir selbstverständlich zu berücksichtigen. Wir werden sie jedoch ablehnen müssen, wenn keine Zimmer mehr verfügbar sind.

Denkt also nicht zu lange nach! Seht in die zuletzt erschienene Ausgabe 01/2018 des Fervoja Esperantisto, füllt das dort abgedruckte Anmeldfeformular aus, sendet es mit Papierpost an die Adresse:

BSW-Ortsstelle Werk Kassel
Freizeitgruppe Esperanto
Frasenweg 20-36
3428 Kassel
oder per eMail an esperanto@bsw.24.de

Und vergesst nicht Teilnahmegebühr und die Hotelkosten mit dem Vermerk
„Esperanto – Prerow“ zu überweisen an:

Stiftung Bahn-Sozialwerk (BSW)
Sparda-Bank West
IBAN: DE96 3606 0591 0002 4024 02
BIC: GENODED1SPE

21.07.2018
Aliĝofino Prerow

(trad. Brandenburg)

Lastaj vortoj	Letzte Worte
Karuloj, kiam pasis mia Spirit', pri mi ne ploru vi; Ĉar lumas jen en paco Dia Eterna tago ja al mi.	Geliebte, wenn mein Geist geschieden, So weint mir keine Träne nach; Denn wo ich weile, dort ist Frieden, Dort leuchtet mir ein ew'ger Tag.
En tiu senaflikta foro Memoru daŭre mi pri vi, Por viaj vundoj kaj doloro Mildigon volas peti mi.	Wo aller Erdengram verschwunden, Soll euer Bild mir nicht vergehn, Und Linderung für eure Wunden, Für euern Schmerz will ich erflehn.
Se venas kun flugilo sia La nokta paco al la ter', Ne pensu plu pri tombo mia, Salutas mi el stela sfer'.	Weht nächtlich seine Seraphsflügel Der Friede übers Weltenreich, So denkt nicht mehr an meinen Hügel, Denn von den Sternen grüß' ich euch!
(trad. Manfred Retzlaff)	**Annette von Droste-Hülshoff**

Manfred Retzlaff
4-a de Novembro 1938 - 1-a de Junio 2018

Kia paro – Thea kirlema, ideoriĉa, ĉiam en movo – Manfred en pensoj kvazaŭ ŝvebanta, nur malvolonte preta degrimpi la sinon de Kaliopo, Erato aŭ Eŭterpo. Tiel estas la unua memoro pri la duopo el Oelde en bonaj tempoj.



Bonaj tempoj / gute Zeiten (Thea, Manfred kaj Margret)
(Foto: Hedwig Fischer)

Thea formanta, organizanta, obstine mobilizanta, amoplene zorganta – Manfred silentiĝinta, kun bedaŭra rideto, sed ĉiam denove

Manfred Retzlaff
04.11.1938 – 01.06.2018

Welch ein Paar – Thea quirlig, ideenreich, immer in Bewegung – Manfred in Gedanken wie schwebend, nur ungern bereit vom Schoß der Kalliope, Erato oder Euterpe herunterzuklettern. So ist die erste Erinnerung an die Zwei aus Oelde in guten Zeiten.

Thea gestaltend, organisierend, hartnäckig mobilisierend, liebevoll versorgend – Manfred verstummt, mit bedauerndem Lächeln, aber immer wieder bemüht. So war der Eindruck der letzten Jahre, als der zweite, entscheidende Schlaganfall Manfred die Sprache und weitgehend die Bewegungsfähigkeit genommen hatte.

Mit seinem Tod ist die optimistische Hoffnung auf Erfolg der Bemühungen und seine Rückkehr in den Kreis der Freundinnen und Freunde erloschen.

Manfred hatte sich zeitlebens für Sprachen interessiert. Vor jeder Auslandsreise stand der Versuch, sich mit der jeweiligen Landessprache anzufreunden. Esperanto muss für ihn eine Offenbarung gewesen sein, nicht nur wegen seiner Rolle als Brücke zwischen den

klopodanta. Tia estis la impreso pri la lastaj jaroj, kiam la dua, decida apopleksia atako estis preninta de Manfred la parolon kaj grandparte la movokapablon.
Kun lia morto estingiĝis la optimisma espero pri efiko de la klopodoj kaj lia reveno en la rondon de la geamikoj.
Manfred dumvive estis interesita pri lingvoj.
Antaŭ ĉiu vojaĝo eksterlanden staris la provo amikiĝi al la respektiva landa lingvo. Esperanto devis esti revelacio por li, nen nur pro ĝia rolo kiel ponto inter la homoj, sed precipe pro ĝia riĉeco je formoj kaj esprimebloj. La nura amaso de tradukoj kaj adaptoj de poezio el la germana, la frisa, la dana, la rusa atestas lian entuziasmon.
Des pli li estis suferinta pro la mutiĝo, pro la kompleta perdo de la parolo.
Do Manfred foriris mallaŭte, mallaŭte kaj retirite.

Guido Brandenburg

Menschen, sondern vor allem wegen seines Reichtums an Formen und Ausdrucksmöglichkeiten.
Die schiere Masse an Übersetzungen und Adaptionen von Poesie aus dem Deutschen, dem Friesischen, dem Dänischen, dem Russischen zeugt von seiner Begeisterung.
Um so mehr hat er unter dem Verstummen, unter dem völligen Verlust der Sprache gelitten.
So ist Manfred ist leise gegangen, leise und zurückgezogen.



(trad. Brandenburg)

Horst Jasmann forpasinta

Atentaj fervojaj esperantistoj memoros pri Horst Jasmann, amiko plenuminta gravajn taskojn en nia asocio. Kiel respondeculo por varbado kaj informado li flegis la kontaktoj al la ekstera mondo. Kiel distrikta komisiito por Berlin li reprezentis la tie loĝantajn membrojn. Kaj komune kun Fritz Lautenbach li naŭ jarojn redaktis nian bultenon ĝis li pro malsaniĝo devis retiriĝi de siaj taskoj kaj ankaŭ de la asocio.



La geedzoj Lepke kaj Jasmann dum jarkunveno 2002 en *Baiersbronn*
Die Ehepaare Lepke und Jasmann beim Jahrestreffen 2002 in Baiersbronn
(Foto: Siegfried Krüger)

Horst Jasmann verstorben

Aufmerksame Eisenbahner-Esperantisten werden sich an Horst Jasmann erinnern, einen Freund, der wichtige Aufgaben in unserer Vereinigung erfüllt hatte. Als Verantwortlicher für Werbung und Information pflegte er die Kontakte zur Außenwelt. Als Bezirksbeauftragter für Berlin vertrat er die dort wohnenden Mitglieder. Und gemeinsam mit Fritz Lautenbach redigierte er neun Jahre lang unsere Zeitschrift bis er sich wegen einer schwerwiegenden Erkrankung von seinen Aufgaben und auch aus unserer Vereinigung zurückziehen musste.
Nun hat uns aus Berlin die Nachricht erreicht, dass er, schon in eine andere Welt gegangen, am 22. Februar 2018 im Alter von 81 Jahren verstorben ist.
Wir kondolieren seiner Frau und seiner Familie von Herzen.

Nun el Berlino atingis nin la mesaĝo, ke jam irinte en alian mondon li mortis la 22-an de Februaro 2018 en aĝo de 81 jaroj.
Ni elkore kondolencas al lia edzino kaj lia familio.



Guido Brandenburg (trad. Brandenburg

Kun bedaŭro ni anoncas la morton de niaj fidelaj membroj:	Mit Bedauern zeigen wir den Tod unserer treuen Mitglieder an:
22-an de Februaro 2018 **Horst Jasmann el Berlin** en aĝo de 81 jaroj	22. Februar 2018 **Horst Jasmann aus Berlin** im Alter von 81 Jahren
Februaro 2018 **Hans-Jörg Bloom el Seesen** en aĝo de 81 jaroj	Februar 2018 **Hans-Jörg Bloom aus Seesen** im Alter von 81 Jahren
10-an de Majo 2018 **Johannes Jankowski el Dortmund** en aĝo de 89 jaroj	10. Mai 2018 **Johannes Jankowski aus Dortmund** im Alter von 89 Jahren
1-an de Junio 2018 **Manfred Retzlaff el Oelde** en aĝo de 79 jaroj	1. Juni 2018 **Manfred Retzlaff aus Oelde** im Alter von 79 Jahren

Redaktofino por FE 03/2018 estos la 15.08.2018		Redaktionschluss für FE 03/2018 ist 15.08.2018	
Eldono:	Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt/M.	Herausgabe:	Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt/M.
Redakcio:	Guido Brandenburg	Redaktion:	Guido Brandenburg
Adreso:	Görlitzer Straße 17 48317 Drensteinfurt	Adresse:	Görlitzer Straße 17 48317 Drensteinfurt
Telefono:	02508-9107	Telefon:	02508-9107
Fakso:	02508-984511	Fax:	02508-984511
Retpoŝto:	fervoja.esperantisto@t-online.de	Email:	fervoja.esperantisto@t-online.de
Kotizkonto:		Beitragskonto:	
Nomo	BSW Esperanto Essen	Name	BSW Esperanto Essen
IBAN:	DE44 3606 0591 0000 5045 63	IBAN:	DE44 3606 0591 0000 5045 63
BIC:	GENODED1SPE	BIC:	GENODED1SPE
Donacoj estas bonvenaj sur konto:		Spenden sind willkommen auf dem Konto:	
Nomo	Karl Bernhard GEFA	Name	Karl Bernhard GEFA
IBAN:	DE16 5009 0500 0000 9537 29	IBAN:	DE16 5009 0500 0000 9537 29
BIC:	GENODEF1S12	BIC:	GENODEF1S12